

e . religis



humanitaristaj principoj

Antaŭparolo de la tradukinto ...	3
(S. Pragano)	
La Humanitaristaj Principoj ...	9
Parabolo pri la Hodiaŭa Homo ...	15
Esperanto, lingvo de la Paco ...	19
Sennaciismo (el "Cosmopolis").	26



Suplemento
de

La Juna Penso - F 47340 Laroque Timbaut

Apr. 1974 - N-ro 97A

Antaŭparolo

La sekvantaj paĝoj bezonas, laŭ mia opinio, nenian klarigon. Ili estas despli facile komprenotaj, ĉar ilia verkinto esprimis la sentojn de multaj el siaj legontoj, ĉar ili donis precizan formon al pensoj ŝvebantaj en la aero kaj nekonataj nur de tiuj kiuj volas ilin nepre ignori. Ĉar la homaro estas kaj restas esence pacema, kaj oni devas miri ke neniuj generacio sciis profiti la maldolĉan sperton de alia generacio kaj lasis sin ĉiam premi de evidenta malplimulto de intereso, en la nomo de la samaj sensencaj artefaritaj idealoj. Post la lasta milito, en kiu partoprenis la plej...civilizitaj popoloj de la mondo, kaj dum kiu, spite de ĉia militista arto zorge kulturita, la hazardo diris la decidan vorton, - multaj pensuloj komprenis ke estas homa devo uzi ĉiujn siajn fortojn por malhelpi la reokazon de tiaj eviteblaj krimoj. Ili interpretis la timemajn flustrojn de la multaj humiluloj kaj diskriis fortavoĉe ilian sopiron, instigante ĉiujn sinkorporajn homojn al pensemo, kaj precipe al agado.

Mi ne intencas prijuĝi la valoron de la verko, kiun mi nun prezentas al nia internacia legantaro. Sed mi opinias ke estas utile prezenti kune kun la verko ankaŭ la verkinton.

Eŭgen Relgis, la fondinto de la humanitarista movado en Rumanujo, estas kuraĝa batalanto por la interfratigaj ideoj. Per senĉesa ĉiutaga propagando li sukcesis kolekti ĉirkaŭ si aron da kunlaborantoj, kune kun kiuj li sisteme disvastigas en la lando la humanitaristan pensaron.

Naskiĝinte - la 2-an de Marto 1895 - en urbo Iași, li kutimiĝis de sia plej juna infaneco observi sian internan profundon. Pro aŭdodifekto kaŭzita de skarlatina malsano li estis devigata vivi izolan vivon, malproksime de la bruaj ludoj de liaj samaĝuloj. Eĉ en la lernejo li nur malfacile povis sekvi la kursojn, ĉar li ne bone aŭdis la parolojn de la profesoroj. Tamen li

diligente studis, en soleco, kaj finis la liceon multe pli matura ol liaj kunuloj. Liaj verkoj respegulas fidele la rezultatojn de tiu ĉi konstanta sinobservado kaj distingiĝas per riĉa idearo kaj profunda analizo de la animo. En unu el siaj verkoj, "Voĉoj senbruaĵ", li eĉ studas la animbatalojn de homo, kiu - pendinte la aŭdopovon - sin formas per streĉo de sia volo, izole, preparante sin por la socia vivo.

Sian unuan libron, "La Triumfo de l'Neesto" Relgis aperigis en 1913, estante ankoraŭ en la liceo; ĝi entenis kelkajn simbolajn fantaziaĵojn. Sekvis en 1915 poemaro: "La Frenezeco", poste en 1918, "Sunleviĝo", japanaj skizoj, legendoj kaj notoj.

Fininte la liceajn studojn, li enskribigis sin ĉe la Filozofia Fakultato de la Bukureŝta Universitato, sed devis rezigni pro la sama neebleco sekvi la kursojn. Lia intereso pri la teknikaj sciencoj portis lin al la Arĥitektura Altlernejo en Bukureŝti, post kies vizito li laboris kelkajn jarojn en diversaj konstruejoj. El tiu ĉi tempo li inspiras sin por siaj "Poezioj" kaj por la volumo de ritma prozo "La Melodioj de l'Silento".

Sekvis lia trilogio "Petru Arbore" kiu estas la unua animanaliza romano en la rumana literaturo. Studante sian heroon, kiu estas tipo individueca volanta sin koni, sin liberigi kaj eniri la vastan socian realaĵon, - Relgis traktas la krizojn de konscienco koncerne al la novaj sociaj tendencoj, kaj la medio estas jen la urbego, jen la vilaĝo, jen la fabriko, la hospitalo aŭ la universitato. Sed sian heroon li studas laŭ tiel ĝenerale homa vidpunkto, ke se li nomiĝus "Petro Arbo" ekzemple, li povus same bone ekzisti en kiu ajn lando.

La mondmilito signis novan etapon en la agado de Relgis. Laborinte ĝis tiam sur la kampo pure literaturo, li nun okupiĝas pli multe pri la sociaj problemoj. Li skribas "La milita literaturo kaj la nova epoko" kiu, traktante la literaturan problemon rilate al la milito, estas reago kontraŭ ĉia milita literaturo; li indikas tie ankoraŭ la ecojn de la literaturo en la estonto.

En la sekvinta volumo, "Kolono inter Ruinoj" li prikskribas la konscienco-batalojn de la homo, kiu volas konservi sian homecon meze de la teruraĵoj lin ĉirkaŭantaj;

li ankaŭ studas en formo literatura-filozofia la soci-
ajn problemojn, konsiderante ilin precipe laŭ la vid-
punkto individueca, spirita kaj humanitarista.

Post la milito li komencis la sisteman humanitaris-
tan propagandon. En 1920 li fondis la revuon "Umanita-
tea" (Homeco).

Li ellaboris poste la rumanan eldonon de la ĉefverko
de Georg Fr. Nicolai, "La Biologio de l'Milito" kiu
ĝuis speciale bonan akcepton ĉe la rumana intelektularo.
Sed dum Nicolai studas la militon sole laŭ biologia vid-
punkto, montrante la sciencajn elementojn por la pacif-
ismo kaj la internaciismo, Relgis aplikas tiujn ĉi sur
la kampo de la socia batalo.

Vojaĝo tra Aŭstrujo kaj Germanujo kaj partopreno en
diversaj kongresoj preparas lin por novaj taskoj. En
"Pilgrimoj" li parolas, sub formo de vojaĝaj notoj, pri
la spirito de la nuntempo kaj pri la postmilitaj proble-
moj.

En Novembro 1921 li finis sian ĝisnunan ĉefverkon :
"La Humanitarismo kaj la Internacio de la Intelektuloj"
en kiu li provas starigi la fundamenton de la humanita-
rista doktrino. Li tie montras la rilatojn inter la hu-
manitarismo kaj la individualismo, estetiko, scienco ,
religio, socialismo ktp. kaj konkludas por la harmoni-
igo de la diversaj sferoj de la homa agado en la plej
alta sfero de la homeco, kiu estas bazita sur la prin-
cipoj de la biologio, tekniko, kaj kulturo. En la sama
libro Relgis studas la eblecojn de la starigo de "Inter-
nacio de la Intelektuloj", pri kio oni cetere trovos
kelkajn ideojn en la jena libro.

Lasttempe aperis plia verko pri "La Humanitarismo
kaj la Socialismo", en kiu li pritraktas la interligojn
inter tiuj du grandaj nuntempaj movadoj.

° °

Ĉiuj liaj verkoj apartenas al la tutmondo, ĉar li adre-
sas sian penson al la tuta homaro. Siajn verkojn li ta-
men skribas en lingvo nacia, la sola, kiun li - kiel la
granda plimulto de la verkistoj - plene posedas. Partoj
el liaj verkoj jam estas tradukitaj en la lingvoj fran-

ca kaj germana. Sed li konscias pri la bedaŭrinda malŝparo de energio kaŭzata de la multnombraj tradukoj de unu verko. Tial li kun speciala simpatio interesiĝis pri la eldono de Esperanta traduko el siaj verkoj, ĉar nur tia traduko estas - same kiel lia penso - destinita al la tutmondo.

Kun aparta saluto de la aŭtoro mi do prezentas tiun ĉi verkon al la ŝtatanoj de nia internacia Esperantujo kaj esperas ke ili akceptos ĝin kun ŝato.

La Tradukinto

Biografia aldono

(Noto de LJP-broŝurservo: Ĉar la origina antaŭparolo, kiun oni ĵus legis, estis verkita de la tradukinto - S. Pragano - okaze de la unua eldono en 1928, ni aldonas ĉi-sekve kelkajn notojn por kompletigi la biografion de E. Relgis.)

En 1923 Eugen Relgis fondis la unuan humanitaristan grupon. En lia libro "Kio estas la Humanitarismo" (1966) oni povas legi la nomojn de la internacie famaj eminentuloj, kiuj aliĝis. En Rumanio kreiĝis 23 "Centroj de Humanitarista Agado" (1923-1928), en aktiva rilato kun similaj alilandaj movadoj. En 1927 li prizorgis la revuon "Cugetul Liber" (La Libera Penso) kaj poste la revuon "Umanitarismul" (1929-1930), kiu diskonigis sian humanitaristan kaj pacistan agadon en Rumanio kaj en aliaj landoj. Li multe vojaĝis en Eŭropo kaj partoprenis plurajn internaciajn kongresojn.

Ekde 1935 la faŝismo instaliĝis en Rumanio kun la diktaturo de Karolo la 2a, la regado de Generalo Antonescu kaj, de 1939 ĝis 1944, la okupado de la lando fare de la naziaj armeoj, kiujn poste forpelis kaj anstataŭis la sovetiaj. Dum dek jaroj E. Relgis devis silenti...

En Septembro 1947, post longa kaj peniga atendo, Relgis fine povis eliri el Rumanio, dank'al la morala subteno de kelkaj grandaj eŭropaj kaj amerikaj verkistoj, kaj ankaŭ dank'al la diskreta helpo de kelkaj malnovaj

kunlaborantoj en Rumanio. Li forlasis sian bibliotekon, siajn arkivojn kaj ĉiujn siajn posedaĵojn, sed li kunportis siajn manuskriptojn, kiuj poste estos eldonitaj en la hispana lingvo.

Relgis loĝis en Parizo ĝis li povis akiri vizon por Urugvajo (La Peronista registaro rifuzis al li eniri en Argentinon.) En Urugvajo, Relgis, 53-jara, rekomencis sian laboron, unue lernante la hispanan. En libera etoso sed kun ĉiuj ekonomiaj malfacilaĵoj, kiujn suferas verkisto luktanta por siaj ĉiamaj idealoj, li disvolvis siajn kulturajn, humanistajn kaj pacistajn aktivecojn.

Li larĝe kompensis la tempon perditan en Eŭropo dum la nigraj jaroj da diktaturo kaj milito. En 20 jaroj li publikigis 40 librojn kaj broŝurojn, kaj 1700 artikolojn, notojn kaj eseojn en diversaj revuoj kaj gazetoj de Ameriko kaj Eŭropo, gvidis kursojn kaj 300 konferencojn en Fakultatoj, ĉe la oficiala elsendstacio SODRE, en Montevideo, en Argentino kaj en pluraj popolcentroj por kultura disvastigo.

En 1962 Relgis revenis al Eŭropo por esplormisio, kiun konfidis al li la Universitato de Montevideo. Sed akcidento devigis lin reiri al Montevideo, kie li ankoraŭ nun troviĝas.

Laŭ siaj propraj deklaroj, E. Relgis ne volas lasi "postmortajn verkojn"; malgraŭ sia granda aĝo li pluprizorgas aktivajn internaciajn rilatojn.

Liaj verkoj, liaj manuskriptoj, liaj leteroj (proks. 20 000), la dokumenta kaj bibliografia materialo havos sian lokon en la arkivaro de la Hebrea Universitato de Jerusalemo, en la Internacia Instituto pri Socia Historio en Amsterdamo kaj en kelkaj universitataj bibliotekoj. Ĝi estas la eksterordinara verkaro de ununura homo, margene de ties kultura kaj humanista aktiveco.

---o---

La kompleta bibliografio de Eugen Relgis troviĝas en la Internacia Instituto pri Socia Historio en Amsterdamo.

La humanitaristaj principoj

I.

"Mi estas homo!" - jen estas la respondo kiun ni devas doni ankaŭ al nia propra konscienco, ankaŭ al tiuj, kiuj demandas nin, al kiu nacio, religio aŭ ŝtato ni apartenas. Sed tiu ĉi respondo signifas: - Mi scias ke mi estas la rezulto de biologia evoluo; ke en mi estas la simio, la rampulo, la vegetaĵo, la mineralo; mi scias ankaŭ ke mi devas perfektigi en mi la homecon forĝitan de la malaperintaj generacioj; - ke mi devas konservi la hereditajn kulturon kaj civilizojn, pliampleksigante ilin laŭ mia povo. Ĉar, rigardante en la pasinton, mi antaŭsentas la estonton; - min homigante mi preparas por la posteuloj novan ŝtupon sur la ŝtuparo de la progreso.

II.

La bazo de nia homeco estas en du ideoj, kiuj estas ankaŭ du realaĵoj: la individuo kaj la speco, - la ĉelo kaj la organismo. - La liberecon oni povas ĉiam harmonigi kun la neceseco: mia volo individua trovas la kampon por kreanta agado en la kadro de la speco. Ni venkas la naturajn fatalaĵojn, se ni rekonas ilin. Sociaj fatalaĵoj ekzistas nur por tiuj kiuj havas nek individuan nek specan konsciencon.

Inter la simpla unueco de la homo kaj la supera unueco de l'homaro, ne ekzistas aliaj naturaj unuoj perantaj - sed sociaj kaj politikaj formoj: familio, tribo, klaso, nacio, ŝtato, raso... Ĉiuj ĉi tiuj estas artefaritaj, transiraj: ni ne absolute rekonas ilin. Ni liberigu nin de ilia tiraneco, se ili paralizas nian personecon kaj se ili ne korespondas al la progresemaĵoj tendencoj de la homaro.

III.

La kredo je progreso estas la suko de nia homeco. Ĝi ne estas mistika aŭ nur idealista kredo. La idealo naskiĝis el realaĵoj, ne el revoj. La per la homo konsciiginta antaŭenemo de la naturo trovas siajn formojn ĉiam pli kaj pli perfektajn - malgraŭ ĉiuj universaj katastrofoj kaj promilitaj ruiniĝoj. La bazo de ĉiu materia kaj spirita progreso estas en la cerba progreso: - alta ideo ĝermas nur en menso purigita de la nebulo de l'nescio, de la fantomoj de l'superstiĉo, de la fetiĉismoj. La plimulto de la homaro havas la menson en letargia stato; ni ve ku per pozitiva kaj libera edukado la en ĝi kaŝitajn kapablojn. La homeco natura, elkora, vidos kaj agos pli bone kiam ĝi estos kondukata de la Inteligenteco.

IV.

La centra ordono de la homa konscienco estas: La ideo fariĝu ago. Nur tiemaniere oni rimarkos nian sincerecon kaj ni kontrolos niajn fortojn. Per tiu ĉi ordono ni atingos ankaŭ la naturan leĝon de la harmonio. Ĉar homeco signifas ankaŭ la harmoniigon de la maloj. Ĉiam servu al tiu ĉi ekzemplo la dualismo de la naturo, kie ĉio aperas tamen en absoluta harmonio.

Materio kaj spirito? - ni spiritigu la materion!

Individuo kaj aro? - ni personigu la aron!

Arto kaj laboro? - ni beligu la kreantan penadon!

Religio kaj scienco? - ni kedu la veron!

Proletariaro kaj kapitalo? - ni socialigu la produkt-rimedojn!

Barbareco kaj kulturo? - ni civilizu la popolojn!

Dio kaj eklezio? - ni diigu la homojn!...

Ĉiuj homaj agadoj restu en siaj naturaj limoj, sed konservante la vivrilatojn inter si: - ĉiu el ili celu, per speciala klopodo, la ĉiuflankan evoluigon de la individuigita homaro.

V.

La pacifismo estas la unua akso de la humanitarismo. Ni estu konvinkitaj ne nur pri la paciga misio de la homo sed ankaŭ pri lia paca deveno. La pratempa sociemo, en la epoko de niaj simiaj prauloj, kaj la anatomio de lia korpo montras, ke la homo ne havis aliajn armilojn krom la nombra solidareco kaj la inteligenteco.

La pacifista agado celu unuavice la vekon de la prapacifismo. La malamo inokuliĝis en la koron de la homo sekve de la multigantaj militoj. Per la ekkono de la homa deveno, de la evoluokondiĉoj de la civilizacio kaj ĉefe per tiu konscienco de la "homara organismo", ni plifortigas en ni la individuan pacemon. - Montrante al ĉiu, ke la militoj, ĉefe tiuj el la moderna epoko, estas vanaj el ĉiuj vidpunktoj, ĉar ili donas rezultojn kontraŭajn al la deziritaj, - ni plifortigas la pacemon de la popolo.

Bazite sur sciencaj elementoj, - biologiaj, ekonomiaj k.a. - ni povas doni al la pacifismo la fortecon de l' konvinko sekvata de la ago. La ordono de la konscienco: Ne mortigu! (kiu signifas la respekton por la vivo, por kies ajn vivo!) - unuiĝos tiam kun la deziro de l'koro: Pacon al vi! - (kiu signifas fratecon inter la individuoj kaj harmonion inter la interesoj de la liberaj popoloj).

VI.

La internaciismo estas la dua akso de la humanitarismo. Ĝi aperas el la pacifismo, kiel la branĉoj el arbotrunko. Ĝi ĉiam ekzistis sub nomoj diversaj. La tribo aŭ rasa solidareco, la interligiĝoj inter nacioj aŭ sociaj klasoj, la asociado inter grupoj disaj tra ĉiuj kontinentoj - eĉ la divido de la laboro inter individuoj kaj popoloj, - ĉiuj estas nur formoj (kelkaj embriaj, aliaj hibridaj) de la internaciismo, aŭ pli bone dirite: de la interdependeco.

La intereso estas, ĉie kaj ĉiam, en la unua vico. La ekonomia internaciismo estas akceptata de ĉiuj, kvankam ĝi havas ankoraŭ la formon de la politika imperialismo. La teknika internaciismo estas evidenta, ekzemple, ĉe ĉiu progreso de la flugmaŝinoj, aŭ de la maŝino, kiu anstataŭas la krudan laboron de la homo. La internaciismo de la sciencoj estas tro evidenta: la vero aperas el la kvar punktoj de la horizonto, same kiel la kanto de la poetoj, kiel la parolo de la profetoj...

La kulturo kaj la arto de ĉiu nacio havas komunan esencon: per la samaj radikoj ili sorbas la sukcon el la sama tero: la floroj kaj la aromoj estas diversaj. El tio konsistas la beleco de l'homa ĝardeno, en kiu harmoni-

iĝas - submetitaj al la sama sorto - la naciaj , sociaj aŭ personaj individuecoj.

VII.

La tendenco al unueco - estas la esenca signifo de la pacifismo kaj internaciismo. La paco inter la organoj kaj la interdependeco de iliaj funkcioj formas la sanan unuecon de la individua organismo. La paco inter la nacioj kaj la ekonomia, teknika, scienca kaj kultura internaciismo, preparas la superegan unuecon de la homaro. La tendenco al unueco enhavas ĉiujn specialajn progresojn: - en unueco, la diverseco.

Tra la morala unueco, kies leĝo estas la akordo inter ideo kaj ago: - tra la psiko-fizika unueco, tio estas: la ekvilibro inter spirito kaj korpo; - tra la socia unueco kiu estas la harmonio de la interesoj de la diversaj klasoj neparazitaj; - tra la nacia unueco, kiu estas la sintezo de la individuaj kaj sociaj unuoj el certa geografia regiono, kaj sen atakema karaktero kontraŭ aliaj nacioj; - tra la rasa aŭ kontinenta unueco enhavanta la naciajn unuojn parencajn per la sama civilizo, per "kultura patriotismo" aŭ per la neceseco de paca ekonomia ekspansio; - tra ĉiuj tiuj ĉi progresaj unuecoj, ni proksimiĝas al la planeda unueco de la homaro.

La specia unueco ekzistas depost la apero de l'homo : ĝi nomiĝas ankaŭ "la organismo de la homaro". Ni estu konsciaj pri tiu ĉi tendenco: - ĉiuj homaj agadoj kunhelpos en la preparo de la unika ŝtato de la homaro; tiu ĉi "universala ŝtato" estos la socia esprimo de la biologia realeco de l'homaro kaj de ĝia teknika, ekonomia, kultura kaj spirita progreso. Finfine, tiu ĉi "Universala Ŝtato" malaperos en la konscia organismo de la tuta homaro.

VIII.

La civilizanta evoluo, - jen estas la humanitarista metodo. Ĝi rezultas el la aliaj principoj kaj ĝi ne estas io alia, ol daŭrigo de la natura evoluo direktata de la homaj inteligenteco kaj forto.

Ne povas ekzisti frukto sen ke ekzistu antaŭe radikoj, trunko, branĉoj, foliaro kaj floroj, precipe ne sen la suko longtempe sorbita el la tero. La samo validas por la

individuo, popolo kaj homaro. Estas bezonataj ĉiuj elementoj kaj ankaŭ la necesa tempo; kaj ĉiu elemento estas bezonata je preciza tempo! De ŝtupo sur ŝtupon, de unu pinto al la alia, - tiamaniere idealo efektiviĝas. Sed ne definitive! - ĉiam tra nesentataj transformiĝoj, per naturaj progresoj, per konscia volo...

La perfekteco ne ekzistas - ekzistas nur celado al perfekteco. La revolucia metodo apartenas al tiuj, kiuj opinias, ke oni povas plene atingi la idealon, ke oni povas anticipi la venonton. Unu revolucio naskas alian revolucion, kiel ankaŭ milito preparas alian militon. La vera revolucio estas nur la lasta fazo de la evoluo.

La utopiistoj kaj tradiciemuloj estas la sklavo de la Absoluto. La estanteco devas esti viva sintezo de la pasinteco kaj de la estonteco: la simio kaj la superhomo interfratiĝu en la hodiaŭa homo, kiu estas ja nur ringo en la ĉeno de la vivo, - kreskanta en senfina spirala ciklo.

IX.

Amo kaj libereco - jen estas la homigaj "armiloj", kiujn oni uzas laŭ unu sola leĝo: Konu vin mem! Sin liberigante de sub la parazitiginta tradicio kaj de la memocentra amo, kiu sin montras nur sub formo de malamo - , oni povas atingi ke oni vere amu sian proksimulon kaj ke oni defendu ties liberecon, kiel sian propran.

La perforto sur la socia kampo kaj la netoleremo sur la kampo morala kaj intelekta, ne havas alian rezulton ol estigi kontraŭforton kaj kontraŭan netoleremon. La tiranoj, - klasoj, ŝtatoj, rasoj, - kiuj subpremis la plimulton de la homaro, pereis pro sia propra diskreskemo: Ili volis kreski senĉese, forgesante aŭ ne volante scii, ke ekzistas ankaŭ aliaj tendencoj al kreskado kaj sinkonservado. La troa ŝarĝo de ilia propra forto pereigis ilin.

Sed la doktrinistoj, - laikaj aŭ ekleziaj - la tiranoj de l'animo kaj ekzekutistoj de la libera pensado, kredis (kaj kredas ankoraŭ) ke la animo kaj la pensaro de l'homaro povas eniĝi en certajn kadrojn, sociajn aŭ spiritajn. Se la "ideala" kadro ne korespondas al la serpentuma vojo, kiun fosas al si en sia natura vojo la ten-

dencoj de l'individuo kaj speco - tiam la kadro rompiĝas. La progreso de la civilizacio tro multe superas la moralan progreson; - via interna homeco - kaj tiu de kiu ajn socia individuo, - konformiĝu al la efektiva humaneco de la planedo.

X.

Ne morgaŭ - sed hodiaŭ komencu vin homigi. Ne atendu ordonon de iu alia, sed aŭskultu vigle vian propran ordonon; tiom da generacioj murmuras en via koro kaj tiom da trezoroj estas ĉirkaŭ vi: - ili atendas por respeguliĝi en via konscienco.

Liberigu vin, eĉ se vi havas ĉenojn ĉe la piedoj: - kion kapablas libera korpo kun enkatenita spirito?

Amu kaj lumigu vian proksimulon per senlaca penado : kion kapablas libera spirito en sencia kaj sklavigita socio?

Estu homo laŭeble multflanka - sed laŭeble plej kapabla en via metio. Kaj povu diri al kiu ajn kaj kiam ajn:

- Mi levis min super mian propran Individuecon, kiu havas tiom da malbonaj heredaĵoj;

- mi levis min super la Klason, en kiun min envicigis mia laboro;

- mi levis min super la Ŝtaton, kies leĝojn mi suferas nur perfortate;

- mi levis min super la Patrujon, kie mi hazarde naskiĝis kaj super la Socion, kiu spekulacias ĉiun mian bezonon kaj agon;

- mi levis min super la Rason, kiu min kreis - kaj, el ĉio ĉi tio konservante nur la belon, la bonon kaj la veron, mi kunfandis ĉion en mian homecon, kiu tamen restas agema kaj pia, sur la tero de mia speco.

Kaj se oni petos legitimilon pri via ŝtataneco, vi respondu simple kaj decide:

- Mi tian ne posedas. Sed mi volas esti - kaj sentas min, civitano de la homaro.

Parabolo pri la hodiaŭa homo

En la ĉefurbon de ĉiuj riĉaĵoj kaj de ĉiuj mizeroj - en la koron de la lando en kiu pulsadas tiom da aspiroj kaj tiom da suferoj - en la urbon de la laboro kaj de la diboĉo - malsuprenvenis iutage la Solulo de sur sia majesta monto fulmotondra.

Li venis por ekoni ankaŭ la homan vivon. Por rekoni sian similulon. Por aldoni sian homecon - forĝitan tie, sur montpinto - per lia volo kun helpo de instinktoj kaj de l'susuro de la praŭloj vekigintaj dum longaj revadoj - al la suferanta kaj sian havenon serĉanta homaro.

Li venis por krei - por efektiviĝi sian homecon. En sia humilo li opiniis ke li multon ne scias. La scienco lin ravegis. La amo lin vokis...La batakirlo lin logis..

Kaj li iris al la KLERULO: li opiniis lin la nova pastro de l'epoko - de l'animo, de l'menso kaj de la korpo. Li volis serĉi ĉe li lumon, la vorton vojomontran, la plencertecon.

Kaj lin akceptis la Ĉionsciulo en ĉambro kiu ŝajnis esti konstruita el libroj.

Kaj demandis la SOLULO: - Kio estas la Homaro?

Kaj la Ĉionsciulo respondis: Estas organismo, en kiu ĉiuj eroj devas harmonii - kiel la dentradaro en maŝino. Jen... - kaj la Ĉionsciulo elprenis libron el la bretaro "Sociologio" kaj eklegis...

Kaj demandis la INDIVIDUALISTO: - Kio estas la individuo?

- Estas ĉelo el la organismo. Li nepre devas aŭskulti la postulojn de la Socio; esti laborema formiko en la labirinta formikejo; ordnumero inter la sennomaj kaj disciplinaj milionoj...kaj li elprenis libron el la bretaro "Moralo" kaj eklegis.

Kaj demandis la OPTIMISTO: - Kio estas la progreso?

- Ĝi ne ekzistas! La homo estas ĉiam kaj ĉiam la sama bruto mortiganta sian similulon, ŝteladanta, detruanta, kiu...kaj li elprenis libron el la bretaro "Historio" kaj eklegis...

Kaj demandis la PIULO: - Kio estas Dio?

- La religioj tenis la popolojn en nescio. Ili sufokis

la vivon per la nebuleca vivo postmorta... Ekzistas tamen solsole Dio: la pura Racio... - kaj li elprenis libron el la bretaro "Metafiziko" kaj eklegis...

Kaj demandis la SPIRITUALISTO: - Kiu estas la esenco de la vivo? Kio estas la animo?

- La atomo... altiĝo kaj repuŝo... La materio! la materio!... Nia animo estas nur produktaĵo de la korpa laboro. Kune kun la korpo mortas ankaŭ la animo... - kaj li elprenis libron el la bretaro "Fiziko" kaj eklegis.

Kaj demandis la LUKTANTO: - Kio estas la homa lukto?

- Struggle for life... Natura elekto, ... la rajto de la pliforta... alsimiliĝo al la ĉirkaŭaĵo... - kaj li elprenis libron el la bretaro "Biologio" kaj eklegis...

Kaj demandis la MEMFIDULO: - Kion mi devas fari?

- Aŭskulti la sentencojn kaj leĝojn kaj ordonojn starigitajn de Akademioj, de Parlamentoĵoj, de Jarcentoj kaj de la Plimulto. Kaj lerni, lerni... Penadi por ricevi la diplomon pri scio, pri saĝo, pri ordemo... La diplomo! lasta pruvo kaj premio!... - kaj li montris supren, sur la bretaroj, sian dekduon da diplomoj.

Kaj la HOMO timigite rigardis la Ĉionsciulon; Poste, li iĝis grava: Li sentis ke lia unueco estas sendifekta. La vero trovita post fosado de lia interno, tie - sur la suprega punkto de lia volo - kaj kiun konfirmis la Naturo, la eterna universa harmonio - kriis al li sian internan realecon. Kaj li estis fortigita de ĉiuj vivaj fortoj - neŝanĝitaj de la abstraktaj monstroj, de la artefaritaj fataloj".

Kaj la Solulo fikse rigardis la Ĉionsciulon: La varmega Intuicio traboris la glacian Racion... kaj la scienculo eksentis la korean Forton kiu estis invadanta ondon post ondo la senfruktajn rokojn de la Dogmo... Sed li povis ankoraŭ kontraŭparoli:

- Kio? Ĉu vi ne kredas? Ĉu vi ne kliniĝas antaŭ la vero starigita de Akademioj, de...

Sed la HOMAMANTO melankolie ridetis...

- Kio? Ĉu vi kuraĝas malrespekti la civilizon forĝitan per scienco?

Sed la SILENTULO kuntiris siajn brovojn: lia silento parolis... Sed tiu ne komprenis:

- Parolu do, eldiru viajn opiniojn!...

Silento, silento... Kaj la homeco de la Silentulo el-

verŝiĝis per la okuloj, per la spiralo. Kaj sur la frunto profundigis la vertikala fosaĵo de la vivpensado; kaj liaj lipoj kuntiriĝis pro la maldolĉo de la nekomprenata amo... Kaj liaj fingroj tremadis: - ili volis karesi la fraton kiu estis mortiginta sian homecon por fariĝi ĉionscia.

Sed je lia amogesto tiu rapide flankeniĝis:

- Frenezulo! frenezulo! frenezulo!... - kaj vokadis la helpon de la Socio.

Sed la SOLULO insistis:

- Frato! Ĉu vi ne SENTAS mian amon? Ĉu vi ne volas ke unuigu la lumo de mia konscio kun la lumo de via scio?

- Frenezulo! frenezulo! helpon!...

Sed la ELTENANTO insistis:

- Frato! Ĉu vi ne SENTAS ke la vero de mia koro povas kompreniĝi kun la vero de via cerbo? Mia emado kun via prudento?

- Frenezulo! helpon! helpon!

Sed la JUFULO insistis:

- Frato! Ĉu vi ne sentas ke la mondo nun renaskiĝas, - post la ruĝa diluvo? Ke la Spirito venkis la Materion... Ke la mondocentro troviĝas en ĉiu homo... Ke la Ideo devas esti Ago... Ke ĉiu aĵo devas esti viva... Ke en ĉiu homo estas dio atendanta sin senvualigi antaŭ tiu kiu lin serĉas...

- Helpon! helpon! helpon!... - kaj la Socio venis helpi la Ĉionsciulon. Ĝi volis ligi la frenezulon.

Sed la HOMO haltigis ĝin per gesto de senfina mildo - per rigardo dolore larma - kaj eliris el la sankt-sankta biblioteko... el la apoteko de la Racio plena de ĉiaj mirkuraciloj...

Kaj li malsupreniris en la oceanon de la Vivo, kun abismoj kaj lumturoj. La Solulo malsupreniris inter la homojn. Li portis en si la mondon kreitan de li, tie - sur la monto. Kaj li komencis LUKTI inter la homoj kiuj serĉadis vanan saviĝon en la arego de ŝajnaĵoj... Li volis montri al ili la unuan realecon: tiun de la Spirito, - kaj la unuan konon: la sinkonon...

... Kaj ĉiam li luktas kaj kreas. Li fidas je si kaj je siaj blindigitaj homfratoj... Li elkrias sian veron kaj altigas sian faron - tributo de lia ekzisto - sub la harmonioj eternaj...

Li laboradas, laboradas, laboradas...

Kaj ne demandas sin ĉu li finos - ĉu li venkos...Ĉar sian idealon li efektivigas momenton post momento, geston post gesto, vorton post vorto. Lia idealo kreskas kiel viva estaĵo - en lia propra enkorpiĝo... Per li vivadas NUN la estonta harmonio de ĉiuj homoj kiuj venkis sian nehomecon kaj konas sian diecon...

(Premiita en la XIII-aj Internaciaj Floraj Ludoj, 1928)

==O==

Esperanto, lingvo de la paco

Hodiaŭ la pacifismo kaj la internaciismo ne plu estas nuraj ideoj; ili esprimas elementajn realaĵojn kiuj ĉiutage pli kaj pli evidentiĝas, malgraŭ ĉia nacia diverseco kaj malgraŭ ĉiaj ekonomiaj kaj politikaj antagonismoj.

La iloj de paca kaj internacia progresado konservas sian komencon pravecon, eĉ se oni uzas ilin kelkfoje por militaj celoj. La telegrafo restas mirinda eltrovaĵo; ĝi helpas al la homoj interkomuniki, kiam ajn kaj kie ajn: la planedo estos baldaŭ "vasta ĉambro, kie la plej malsamaj voĉoj sin krosos en tutkora kompreno". La flugmaŝino jam nun helpas al la forigo de la landlimoj. Ĝi estas, eble, la lasta ŝtupo de la interkomunika progresado. Oni asertis (inter aliaj ankaŭ G. Fr. Nicolai) ke la graveco de la ŝtatoj estas en rekta interligo kun la progreso de la interkomunikado. La malgrandaj ŝtatoj de l' Mezepoko havis siajn poŝtveturilojn kiuj trakuris 200 kilometrojn tage; kaj Usono tiam formiĝis, kiam la vagonaro povis trakuri en unu tago la distancon inter la Atlantika kaj Pacifika Oceanoj; la unika, universala ŝtato efektiviĝos tiam, kiam la aeroplano rondiros la terglobon en du tagoj.

La teknika progreso signifas ankaŭ progreson de la paco kaj de la internaciismo. La ekonomiaj interesoj ne plu povas esti lokalizataj. La petrolo el Baku estas petata en Anglujo, la rizo el Indoĉinujo estas petata en Parizo, la motoroj el Germanujo ĝuas serĉatecon en la Balkanoj, - kaj ĉie oni ŝatas la amerikan krediton. Super la naciistaj baraktadoj estas la ŝtala kaj ora mano de la internaciaj industrio kaj financoj. Super la ŝovinista konkurenco estas la egala intereso de la popoloj interŝanĝi siajn produktaĵojn, estigante tiamaniere ekvilibron en komunumo ankoraŭ ne oficiala. La "Li-

go de la Nacioj" estas institucio arbitra kaj lameca; ĝi devas esti l'embrio de la estonta tutmonda federacio de la liberaj popoloj.

Oni bezonas kiom eble plej multajn ilojn de paca internaciigo. Ili naskiĝas el la pligrandiĝantaj bezonoj de la popoloj. Post la ekonomia kaj teknika faktoroj, la lingva faktoro evidentiĝas nun kiel pozitiva ilo de la progreso.

Neniu, krom la trogloditoj de la rabeca kaj mortigada politiko, plu povas nei la necesecon de internacia lingvo. Bildon admiru aŭ maŝinon uzi povas ĉiu, ĉie. Lingvo, kiom ajn disvastigita ĝi estus, restas por la plimulto de l'homaro skatolo kun sekretoj. La gravecon de la angla lingvo, ekzemple, klarigas la ekonomia kaj politika superregado de la Anglo-Saksoj. Sed tiuj superecoj estas portempaj kaj bazitaj, ĝenerale, sur perforta imperialismo.

Kiom granda estus la civilizanta rolo de iu lingvo, kiom geniaj estus la verkoj de ĝi produktitaj, - ili enhavas nur parton de la homa spirito, nur parton de la aspiroj kaj veroj de l'homaro. Pasinte tra la lensoj de iu lingvo, la ideoj kaj sentoj havas certajn kolorojn, certajn formojn, certajn influojn. Tradukitaj en alian lingvon, ili deformiĝas, paliĝas, forperdas sian koloron. Inter franco kaj japano, inter ruso kaj amerikano restas ĉiam la muro de la naskiĝa lingvo, malgraŭ ĉia simpatio kiu povus tiri unu al la alia.

"En la plej unua vico devus esti la problemo de la internacia lingvo"; ĝi estas "absoluta necesajo" (1) "Estas necese ke la universala lingvo ekzistu efektive, ĉar ĝi estas unu el la ŝtonoj de la estonta movado, eĉ unu el ĝiaj fundamentoj". (2)

Tiuj, kiuj kondukas la spiritajn kaj sociajn antaŭgordiojn, proklamas tiun novan necesecon, kiu grandiĝas samtempe kun la progreso teknika, ekonomia, socialista kaj kultura. La proletario vokanta al batalo siajn kamaradojn el ĉiuj mondpartoj; la scienculo aŭ teknikisto partoprenanta en internaciaj kongresoj; ĉiu homo emanta al kulturo kaj al homeco sentas la bezonon je komuna interkompreno.

(1) Romain Rolland, en letero al E. Lanty.

(2) H. Barbusse, en letero al la 1a Kongreso de S.A.T. en Aŭgusto 1921.

Oni bezonas helplingvon, kiu povas esti neniu ekzistanta lingvo, oni bezonas lingvon nove kreitan, simplan kaj samtempe sintezan, facilan kaj flekseblan, sen aliaj specialaj ecoj krom la ĝenerala homa fundamento. Ne temas pri forigo de la nacia lingvo; tiu ĉi konservados ankoraŭ siajn miljarajn rajtojn, estante la karakteriza esprimo de la genio de ĉiu lando. Ĝi estas floro, kies nuanco harmoniiĝos kun tiuj de la aliaj floroj el la ĝardeno de la homaro. Aliparte estas evidente ke la progreso de la kulturo kondukas al la simpligo de la lingvoj kaj al la malpliigo de la nombro de l'dialektoj. La civilizitaj popoloj de Eŭropo parolas hodiaŭ nur kvindekon da lingvoj, dum sur la resto de l'globo ekzistas proksimume mil vivantaj lingvoj.

Ĝis nun estis pli ol kvarcent provoj por krei internacian lingvon. Ili malsukcesis unu post la alia, kaj post "Volapük" de Schleyer, Esperanto de D-ro Zamenhof, kreita en 1887, restas modelo, ankaŭ pro sia konstruo (ĉar ĝi estas sintezo de ĉiuj hindo-eŭropaj lingvoj) kaj ankaŭ pro sia senĉesa disvastiĝo. En la lasta tempo aperis ankaŭ aliaj internaciaj lingvoj, kiaj Ido aŭ Esperantido, sed ili estas konsiderataj kiel devenantaj, aŭ eĉ "kopiitaj" el Esperanto. La batalo pro la unuaceco estas akra, sed tiaj prilingvaj disputoj estus senfinaj.

La temo pri elekto de internacia lingvo devas esti solvata per la aŭtoritato de iu Internacio (proletaria aŭ intelektula) kiu povos fakte uzi la elektitan lingvon. Esperanto havas pli da ŝancoj; praktiko pli ol kvardekjara pruvis ĝian vivkapablon. (1) Hodiaŭ ekzistas multnombraj societoj, multaj gazetoj, revuoj kaj Esperantaj bibliotekoj en la okcidentaj landoj de Eŭropo, same kiel en Ameriko, en Japanujo, en Ĉinujo. Oni ĝin instruas, nedevige, en multaj landoj. En la socialistaj landoj la internacia lingvo estos certe baldaŭ instruata al ĉiuj lernantoj. Oni nepre devas elekti la lingvon; la esperantistoj, malpli atentantaj la prilingvan vantemon, ol konvinkitaj pri la neceseco de internacia lingvo, certe akceptos kiun ajn decidon celantan disvolvi la "internaciam senton".

(1) Tiu artikolo estis verkita en 1928! (Noto de la reel-donanto)

La internacia ideo ekzistas, sed ĝi ne iĝas praktika, tio estas: ĝi alportas fundamentan ŝanĝon al la spirito kaj al la rilatoj inter la homoj nur se kune kun ĝi disvolviĝas, per la uzado de la helplingvo je ĉiu okazo, ankaŭ la internaciema sento.

"Tiu, kiu parolas la saman lingvon, ne ĉiam komprenas sin. Kiel do homoj ne havantaj komunan esprimilon povus sukcesi pli bone sin kompreni, sin koni kaj sin ami? Por konduki la homajn arojn al la patriota buĉejo, ne bezonate estas ke ili parolu saman lingvon; sed por malebligi la reokazon de tiaj stultegaj, krimaj hekatomboj, estas bezonate ke la internaciema sento anstataŭ la patriotisman senton en la koroj de la plimulto de l' individuoj".(1)

Tiu ĉi konvinko igis multajn el la propagandistoj de la internacia lingvo ne limigi sin je la prilingva agado. Havante internacian ilon, ili uzas ĝin ankaŭ sur la socia kampo.

"Ĝis nun, la internacia lingvo ŝajnis nur faciligo por la komerco, ia elegantaĵo kaj subtilaĵo por la intelektuloj - kaj tiu ĉi propagando enhavis ion supraĵan, aristokratan kaj monduman..." "La burĝaj esperantistoj estos pli kaj pli mirigitaj kaj terurigitaj de ĉio, kio povas eliri el tiu talismano: ilo permesanta al ĉiuj homoj, kiu ajn ili estus, kompreni unu la alian".(2)

Multaj esperantistoj estas, efektive, revoluciuloj, kaj multaj socialistoj kaj intelektuloj estas esperantistoj. Organizaĵo destinita agadi en tiu senco, estas la "Sennacieca Asocio Tutmonda"(S.A.T.), havanta provizore sian sidejon en Parizo kaj anojn en pli ol dudek landoj. La fundamenta principo, kiu ankaŭ indikas la metodon kaj la kadrojn de la ebla disvolviĝo de tiu asocio, povas resumiĝi je la sekvanta citaĵo el ĝia statuto:

"La ideala socio ne estiĝos tuje el la Revolucio, kiun unuj opinias universala kuracilo. Estas do necese, ke, jam de nun, ĉiu prepariĝu por sia tasko de universala ŝtatanano. Ni devas forĵeti ĉion artefaritan kaj nehomecan ,

(1) E. Lanty: El "Kie troviĝas la problemo pri lingvo internacia" paĝo 24.

(2) H. Barbusse, en la revuo "Esperantista Laboristo", Julio-Aŭgusto 1921.

kion edukado nure nacia fiksis en niaj koro kaj cerbo. S.A.T. celas krei popolon malnacion."

Tiucele, la praktikado de internacia lingvo, la rektaj aŭ perskribaj rilatoj inter la homoj el ĉiuj rasoj, povas kunhelpi al la plirapida venigo de tiu humanitarisma ŝanĝiĝo en la aregoj blindigitaj de la fetiĉismoj de l'militigita ŝtato.

"Nia asocio - skribas al ni E. Lanty en letero de la 14-a de Majo 1922 - ne volas esti nur tia internacio, en kiu nur la gvidantoj interrilatas. La moderna scienco montris al ni, kiu estas la rolo ludata de la senfine malgrandaj ioj en la estiĝo de la fenomenoj.

La laboristoj, same kiel la intelektuloj, devas interkomuniki, je ĉiu okazo, pere de internacia helpa lingvo, por senti sin, jam de nun, apartenantaj al la granda socia organismo, kiu staras super ĉiuj naciaj ŝtatoj.

La plano de nia organizaĵo estas supernacia kaj ne internacia. Ni ne celas nur la internaciismon, sed ankaŭ la universalismon, - kaj certe tion vi komprenas per via esprimo: humanitarismo".

Sed tiun ĉi belan deklaron de principoj ne plene konfirmas la agado de la Sennacieca Asocio Tutmonda. (1) Okaze de ĝia kongreso en 1927 evidentiĝis la konsiderinda progreso de la lingvo Esperanto kaj la kreskanta graveco de la gazetaro uzanta tiun lingvon. Se S.A.T. estus respektinta politikan neŭtralecon, propagadante en la laborista mondo, pere de Esperanto, la kulturon kaj la "universalecan senton", certe ĉiuj estus rekonintaj la altan valoron de ĝia agado. La vasaliĝo de S.A.T. al iu politika partio, - laŭŝajne la komunista - estus eraro tiel grava, kiel la aliĝo de la grupo "Clarté" al la III-a Internacio. (1)

Ni devas memori precipe al tiuj esperantistoj, kiuj estas politikaj batalantoj, ke Zamenhof ĉiam sciis resti en la kadroj de la universala spirito de la lingvo

(1) Noto de la reeldonanto: Ankaŭ ĉi tie la leganto bonvolu noti, ke temas pri la vidpunkto de E. Relgis en 1928. |

kiun li kreis. Edmond Privat resumas en broŝuro (1) la socian kaj etikan koncepton de Zamenhof, kiu publikigis en 1906 projekton de "Homaranista Deklaracio".

"La disputoj kaj la malamo inter la popoloj - finas Zamenhof - malaperos, entute, nur en la tago, kiam la tuta homaro havos unu lingvon kaj unu religion. Tiam ekzistos ankoraŭ tiuj konfliktoj, kiuj eksplodas en la interno de ĉiu nacio: la bataloj inter la politikaj partioj, la bataloj inter la klasoj, la ekonomiaj konfliktoj; sed la plej abomeninda el ĉiuj: la malamo inter la nacioj, malaperos tute" (paĝoj 16-17).

Zamenhof metis la uzadon de neŭtrala lingvo apartenanta al la tuta mondo je la bazo de sia humanitarista koncepto. Li postulis ankaŭ neŭtralan religion, kiu ankaŭ apartenu al la tutmondo. Sen intermiksi la lingvan unuecon kun la religia unueco, Zamenhof konsideris tiujn unuecojn kiel solajn eblecojn de harmoniigo de la popoloj kaj klasoj. La homoj povas gardi sian nacian lingvon kaj ankaŭ la religion de la socia aŭ politika grupo al kiu ili apartenas. Sed ili nur ne forgesu, ke ili apartenas al iu supera realaĵo: la homaro, kies idealoj estas konstantaj kaj kies interesoj staras alte super tiuj de la politikaj partioj aŭ tiuj de la naciaj ŝtatoj.

En broŝuro: "Homaranismo", Zamenhof detale studis la eblecon de forigo de la politikaj, lingvaj kaj ekonomiaj antagonismoj, speciale konsiderante la landon kie li loĝis. Li volis "fari homojn" el kompatindaj kreitaĵoj interbatalantaj pro fiktivaĵoj. Li proponis, ke "en ĉiu urbo oni konstruu homaran templon, kie la 'homaranoj' povus renkonti alireligiajn fratojn kaj kune labori..."

Kaj ne estas utopia tiu ĉi elvoko de la spirita interfratiĝo kondukanta ankaŭ al la "abomeno de la grandaj frazoj, de la mensogoj kaj malvirtoj". Edmond Privat resumas jenmaniere, en 12 paragrafoj, la homaranistan programon de Zamenhof:

1. Konsideru la homaron kiel familion.
2. Tiu ĉi idealo inspiru ĉiujn viajn agojn.
3. Ne prijuĝu homon laŭ lia deveno, sed laŭ liaj agoj.
4. Lando ne apartenas al certa nacio, sed al ĉiuj siaj loĝantoj.

(1) "Zamenhof et l'Unité Humaine", Paris 1922.

5. Trudu al aliaj homoj nek vian lingvon, nek vian kredon.
6. Metu la nomon homo super la naciajn nomojn.
7. La patriotismo devas esti sindonema servo al la regiona komunumo de unu grupo da homoj, sed neniam ĝi estu malamo al aliaj grupoj.
8. La lingvo estas ilo, ne celo.
9. Kun alinaciaj homoj uzu neŭtralan lingvon.
10. Via religia kredo ne estu hereda, sed sincera.
11. Kun alikredaj homoj konduitu laŭ la moralo de respekto kaj reciproka interhelpo.
12. Al la homaranoj montru sentojn de unueco, ne de disemo.

Ni reproduktis tiujn ĉi principojn de Zamenhof kiel averton por la esperantistoj kiuj estas logataj de la kirlo de la politika batalo.

La scienca humanitarismo, kies pacifismo estas bazita sur la biologia realeco de la tuta homa speco, kaj sur la natura, internacia evoluo de la civilizacioj - tiu ĉi humanitarismo estas ankaŭ homaranismo. Ĝia universalismo ne estas nurvorta, sed ĝi estas esprimo de la homa realeco, kiu klopodas, sur tiu ĉi planedo, disrompi la diagojn iĝintajn nenaturaj: naciaj ŝtatoj, kosmopolitaj imperialismoj kaj antagonistaj, laŭklasaj spiritostatoj.

Kaj ĝuste tial la humanitarismo ankaŭ postulas por si unuecan esprimilon. En kiu ajn lingvo sonus la parolo de la homo, ĝi estos ĉiam bonveninta, ĉiam kapabla alporti renoviĝon. Sed unika lingvo, kiun povus kompreni sur la kvin kontinentoj ankaŭ la sklavoj kaj ankaŭ la mastroj, estas por la humanitarismo nova ilo plirapidiganta kaj certiganta la finan venkon.

Pri ŝennaciismo

(Tiu ĉi reĝustigo aperis en la libro "Cosmopolis", reviziita kaj kompletigita eldono en la hispana, 1950, fine de ĉapitro dediĉita al kompilprezentado de la "Manifesto de la Ŝennaciistoj" de E. Lanti).

- Noto de la reeldonanto -

....

Mi povus fini per tiaj gajaj perspektivoj, se mi ne estus devigata doni al Lanti respondon kaj reĝustigon, kiun li mem petis de mi per malfermita letero publikigita en la Bulteno de L.E.F. (Laborista Esperanto-Federacio, Parizo, n-ro 8, marto-majo 1929), okaze de la eldono en Esperanto de la "Humanitaristaj Principoj", al kiuj mi aldonis artikolon pri Esperanto kiel pacifista lingvo.

Ripetante kelkajn el siaj ideoj antaŭe elmontritaj, Lanti esprimas sian malfidon al la klopodoj de la pacistoj. Li konsideras la plejparton el ili kiel patriotojn. La teknikaj progresoj trudos la pacon per la ekonomia unuiĝo de la tero. Antaŭ la patriotoj Lanti estas en stato de necesa sindefendo; li rifuzas la pacifistan tezon, kiu konsentas kun la bonvolo de ĉiaj naciistoj. Li pravus, se nia aktiva kaj senkondiĉa pacifismo lasus iom da loko al la naciisma idolkulto. Superfluas denove refuti kion diras Lanti. Sed Lanti enkalkulas min inter la naciistoj "pro la samaj motivoj kiel Romanon Rolland, Henrikon Barbusse, Profesoron G.F. Nicolai kaj multajn aliajn intelektulojn. Vi estas naciistoj, ĉar via idealo funkcias helpe de nacia lingvo. Por ke kreiĝu sennacieca menso, oni devas pensi kaj skribi en esperanto". (Ĉu Lanti skribas nur en la franca por ataki siajn kontraŭulojn?)

Krome, Lanti petas min, ke mi korektu la aserton, kiun mi skribis en mia teksto (kiu estis eldonita ankaŭ en Esperanto!), ke S.A.T. estus submetita al politika

partio. Lanti konsideras tiun aserton kiel kalumnion disvastigitan de...la esperantistoj de la "Universala Asocio" el Ĝenevo, kiuj sentas sin ĝenataj pro la agoj de la sennaciistoj. En la kongreso de S.A.T. en Gottenburgo (Svedio, 1928) oni voĉdonis rezolucion pri tio.

Mi ĝoje konstatas, ke la SAT-rezolucio de 1928 neas la politikan karakteron de la laborista esperantista movado, kiel ŝajnis al mi en 1925. Pruviĝis pravigita la averto, kiun mi donis al SAT en la artikolo "La Lingvo de la Paco" pri la danĝero de vasaliĝo de la proletaj esperantistoj al politika partio (tiam temis pri la komunista). Ĉar Esperanto proklamas sin universala, ĝi ne povas esti ekskluzivema lingvo: ĝi povas aparteni al neniuj grupo nek partio, sed al ĉiuj homoj, kiuj deziras faciligi la interkomprenon inter la raso, la popoloj kaj ĉiuj etnaj kaj sociaj kategorioj. Esperanto apartenas ne nur al la esperantistoj. Konsideri kiel naciistojn Rolland, Nicolai aŭ Barbusse (kiuj, pro sia aĝo kaj la multa laboro, ne havis la tempon sin ekzerci skribi en esperanto) estas almenaŭ naivaĵo. La alvoko de Romano Rolland favore al Esperanto kaŭzis ke multaj junuloj ĝin lernos. Tiu lingvo estos vere universala, kiam ĝi estos devige instruata en ĉiuj lernejoj.

Sed ĉu la esperantista imperiismo, kiun proklamas Lanti favore al la proletaj esperantistoj, ne estos obstaklo por granda nombro da personoj, kiuj eventuale ŝatus eklerni Esperanton? Ni ne forgesu, ke Esperanto estas hodiaŭ nur helplingvo, kaj ke neniuj fariĝas sennaciceca, nur pro tio ke li parolas aŭ skribas en Esperanto. Por tio necesas universaleca sento, kiun Esperanto ne povas spontane krei, sed kies disvolviĝon ĝi helpas.

Kvankam Lanti kontraŭstaras la politikon de la proletaj gvidantoj - kiuj konsistigas "burokratan oligarkion" tute parazititan - li faris tamen politikan agon, proklamante la esperantistan imperiismon kaj la sennacistan ekskluzivecon. Ĉiu politiko estas imperiisma: ĝi tendencas al senlima disvolviĝo. Mi registras, ke Lanti neas la vasaliĝon de SAT al politika partio - kaj ni ĝojas, povante unuigi la tolereman spiriton kaj la fratan kunlaboron, kiun li proklamas fine de sia malfermita letero.

(Libere trad. A.R.)

77A. Gandhi kaj satjagraho (tri prelegoj) ...	FF 1,00
79A. La Tabuo (kvar noveloj de J.Nesvadba)...	1,00
80A. Initiation à l'Espéranto (An Kaù) ...	1,00
81A. La laborista esperantismo (E.Lanti) ...	1,00
82A. Alveno de abundo (P.V.Berthier) ...	0,60
82B. En anarkista socio, kiel kondutos la individuo? (Johano Grav) ...	0,30
83B. La rentumo, kiun ni pagas (W.Schmid) ...	0,30
84A. Ĉu neperforta revolucio aù revolucia liberiga milito? (T.Ebert) ...	1,00
85A. Vivi en komunumo (M.Schneller) ...	0,60
86A. Manlibro de nova homo (Rufegon) ...	1,00
87A. La granda liberigo de l'homoj pere de scienco (J.Duboin) ...	1,00
87B. Espéranto en 24 pages ...	0,60
88A. Pri edukado (E.Lanti) ...	1,20
89A. Eduko kaj vivsignifo (J.Krishnamurti) }	1,50
89B. Rimarki (kompilo el J.Krishnamurti) }	
90A. Memvola servuto (La Boesi) ...	1,20
90B. Du rêve à la réalité (H. Masson) ...	1,50
91A. El leteroj de E. Lanti ...	1,20
91B. Por la paco (citaĵoj el eminentuloj) ...	1,20
92A. Prognozio (novelaro el la pola) ...	1,20
92B. Esperanto en 24 páginas ...	0,60
93A. Nekombitaj pensoj (S.J.Lec) ...	1,00
93B. Rido sanigas! (poemaro de J.Burger) ...	1,20
94A. La liberecana penso ...	1,00
94B. Anarkio kaj organizo (E.Malatesta) ...	1,00
95A. Absolutismo (E. Lanti) ...	1,00
96A. Ne mortigu! (L. Tolstoj) ...	0,30
97A. La humanitaristaj principoj (E.Relgis)..	1,20
--- Komuna Kantareto (4a eldono) ...	0,60

La prezoj, en francaj frankoj, entenas la afrankon.
 La mendojn adresu al: La Juna Penso, F 47340 Laroque
 poŝtkonto: 3374 04M Bordeaux, Francio.
 Oni povas pagi per int. respondkuponoj.

